

VESPERTO

LITERATURA FOLIO



Numero:213 .
Februaro 2010. 18-a jarkolekto

Redaktanto:

Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto
Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

LINGVOJ

Kial ekzistas tiom da lingvoj sur la terglobo? Estus simple nur unu lingvo, kiun ĉiu komprenas.

Preskaŭ ĉiu jam sentis la malfacilaĵojn de la lingvaj miskomprenoj.

Nin ĉirkaŭas centoj da diversaj lingvoj. Senĉese oni instigas nin lerni fremdajn lingvojn.

Kompreneble per kelkaj mondlingvoj oni povus komuniki kie ajn en la mondo. Sed kiu lernis iun lingvon, tiu scias kiom malfacila estas la lingvolernado. Nur kelkaj homoj povas diri trankvile, ke mi perfekte ellernis la elektitan lingvon. Dum la lernado, kiu daŭras ofte plurajn jarojn, oni devas malhavi multe da aferoj.

Efektive tiom da diversaj lingvoj estas vera puno. Dio punis la homaron, kial oni deziras konstrui turon ĝis la ĉielo.

Sed en iu tago ĉiu puno estas finita kaj oni pardonas al la kulpulo.

Estus bone diri, Dio pardonis al ni kaj ni denove parolas saman, komunan lingvon. Eble tiam ankaŭ la mondo estus pli paca, ĉar la homaro povus komuniki libere sen malfacilaĵoj.

Kiom longe ni devos atendi ankoraŭ ĝis alvenos tiu ĉi momento.

Antaŭ ni estas nur espero kaj eta lumo, ke tiu tago jam estas proksime.

-Redaktanto-



Ludilo

La knabeto ricevis novan ludilon de siaj gepatroj.

Ĝi estis tradukmaŝino. Laŭ la avizo ĝi estas traduki el ĉiuj lingvoj ekzistantaj.

Li ne devos lerni plu fremdajn lingvojn, ĉar per tiu ĉi maŝino li povos komprenigi sin kie ajn en la tuta mondo.

Li estis tre dankema al siaj gepatroj.

Alitage li ekiris por testi la tradukmaŝinon.

Ili loĝis marborde kaj tial multaj eksterlandaj turistoj vizitis la urbon.

Elpaŝante el la domo li tuj ekvidis anglojn. Li entajpis la tekston kaj fukciigis la aparaton. Unue la angloj ne komprenis, kion li deziras.

Baldaŭe maŝinparolo estis aŭdebla el la aparato.

-Mi esti knabeto. Mi voli babili kun vi. Diru al mi el kiu urbo veni?

Antaŭ ol fini la parolon subite la tradukmaŝino „stultiĝis”, ĉar en la sekva momento ĝi parolis ruse, germane, france kaj ankoraŭ ĝi uzis multajn lingvojn.

Li vane premadis la butunojn. La tradukmaŝino ne obeis. Ĝi nur parolis kaj parolis. Fine iu anglo rimarkis:

-Knabeto, se vi deziras komuniki kun ni ellernu nian lingvon. La via estas nur ludilo.

-Ŝaŝa-



Poezio

Ruĝa folio, griza roso

Ruĝa folio, griza roso -
vesperigante ventas,
ploras silente
inter la domoj,
kaj fabelas litaniojn.

Malĝoja kanto de
brunaj arbustoj flugas,
frugilegoj venas,
grakado de frugilegoj
vian fidelan koron ektrovas!

Estas aŭtuno, venas vintro,
falas de sur la arbojn
malvarmiĝante la folio,
vi ne timu, ne malvarmiĝu,
se la vento muzikas.

Hatházi Áron



Tudom, mit tettel, tavaly nyáron ...
Mi scias, kion vi faris en la pasinta somero.

Laca homo

Li sidis riverborde kaj mute rigardis la akvon.

Jam vesperiĝis kaj ankaŭ kelkaj steloj ekaperis sur la firmamento.

Li ĉiam ŝatis sidadi tie ĉi. La rigardo de la rivero trankviligis lin kaj iomete li forgesiĝis pri la brua mondo.

Hodiaŭ li ege laciĝis. De frumateno ĝis vespero li devis labori senhalte.

Estas bone nun tie ĉi sidadi – li pensis kontente – kunfandiĝi kun la naturo estas grandioze. Tio mem la ĉielo.

Unue kun sia patro li estis tie ĉi ĉe la rivero. Tiam ankoraŭ ĝi estis granda aventuro. La malklara, fluanta akvo ravis lin. De kie ĝi venas kaj kien ĝi alvenas? Li ofte ludis per tiu ĉi penso. Se ankaŭ li estus akvero nun povus vojaĝi foren tra landlimoj eble ĝis la maro.

Akvero travojaĝas la tutan terglobon, ĉar sunradioj suĉas gin al la nuboj kaj la nuboj flugas malproksimen, kie ĝi falas surteren kaj ĉio komenciĝas denove.

Tiuj ĉi pensoj zigzagis en lia kapo.

Rigardante la riveron ĉiam venis grandiozaj pensoj.

Vane li laciĝis, tie ĉi li refreŝiĝis. Li sentis forton en siaj muskoloj. Li nun povintus renversi la tutan mondon.

Antaŭ kelkaj minutoj li ankoraŭ estis mortlaca. La gekolegoj nervozigis lin. Kiom da stultaj homoj, kiuj ĉirkaŭas lin. Kiel liberiĝi de ili? Li ne povas forkuri. Ĉie estas stultaj homoj. Eble en iliaj okuloj ankaŭ li estas tia.

Terure!

Kial la homoj ne komprenas unu la alian?

Ĉu la mondo estas perfekta aŭ Dio misfaris ĝin? Eble la nuna mondo estas nur lia eksperimento kaj la sekva estos pli bona. Estus bone vivi tie.

Venteto ekkareasis lian vangon. Kvazaŭ ĝi estus dirinta al li: „Iru hejmen, via edzino atendas lin! Ho, ne forgesiĝu pri viaj gefiloj! Maria kaj Petro.”

La venteto pravis. Liaj edzino kaj gefiloj certe jam atendas lin hejme. Sur la tablo estas la vaporiĝanta vespermanĝo.

Li malsatiĝis. Depost tagmezo li nek trinkis, nek manĝis. Liaj gekolegoj dum la labortempo konstante manĝis kaj manĝis.

Junage ankaŭ li povis manĝi kiam ajn. Iam kun sia amiko li manĝis ĉetoble preskaŭ tutan porkidon de la orelo ĝis la vosto. Ĝi estis bonega amuzo. Ili ĝuis la vivon.

Sed jam tiuj tempoj forflugis. Li mildiĝis. Ĉio mildiĝis ĉirkaŭ li.

Jes, ankoraŭ li amas sian edzinon. Vere la fajro de l' amo ne flagras tiel intense kiel antaŭ du jardekoj. Sed la virino restis por li aminda. Li mensogus, se ne estus turniĝinta al belulino. Malsana estas viro, kiu ne faras tion. Tiaj uloj ne plaĉas al virinoj. Ĉiu scias tion. Ĝi ne estas kokro. La instinkto ordonas. Fari ion kontraŭ ĝi estas vana. La sango, la vivinstinkto superas ĉion.

Tion ankaŭ lia edzino scias kaj ŝi ne koleras pro tio.

En la malproksimo hundo ekbojis.

Ankaŭ li havis hundon. Sed neatendite ĝi mortis. Ofte la perdo de nia ŝatata besto estas pli amara ol travivi la morton de nia proksimulo. Interese. Ĉu ne?

La hundobojado silentiĝis. Denove iĝis profunda silento. Nur la griloj ĉirpis.

Junage li tre ŝatis aŭskulti la ĉirpadon. Ĝi trankviligis lin. Somervespere li kuŝis en la lito kaj la fenestro estis malfermita. En la florgardeno griloj dormigis lin per ĉirpado.

Li devus ekiri hejmen – li pensis, sed tiom bonege li fartis tie ĉi.

La rivero estis lia amiko. Ĝi ĉiam finaŭskultis liajn plendojn. Ofte li aŭdis ankaŭ la respondojn de la akvogutoj, kiel ili konsolis lin.

Li ekstaris kaj mallaŭte adiaŭis de la rivero:

–Ĝis kara rivero! Mi devas iri. Eble morgaŭ mi denove vizitos vin. Mi estas jam laca, treege laca. Forpasis la junaj jaroj. Viaj kirladoj ĉiam estas karaj por mi. Do ĝis!

Malrapide li ekiris. Kelkajn minutojn ankoraŭ li promenis sur la digo kaj revante li rigardis la riveron.

Li estis tre laca. Ĉiuj paŝoj dolorigis lin. Tamen ne la korpa doloro estis la plej terura, sed ege mordadis lian koron la anima. Ĝi povas kadukiĝi la tutan homon.

Morgaŭ alia tago komenciĝos kaj li devos ripozi, ripozi, kaj ripozi ĉar li hodiaŭ ege laciĝis.

-Apáti Kovács Béla-

Por infanoj

Avoĉjo fabelu al mi!

Peĉjo malsaniĝis. Tagojn li devis kuŝi en la lito. La kuracisto malpermesis ellitiĝi al li. Se li ne obeas, tiam Peĉjo enhospitaliĝos. Tion neniu deziris.

La horoj malrapide rampis en la lito. Li ege enuis. Liaj gepatroj ne havis tempon por fabeli.

La knabeto tre ŝatis aŭskulti fabelojn. Sed tiutage neniu fabelis al li.

Se iu almenaŭ unu fabeleton rakontus al li, tiam certe la tempo pasus pli rapide.

Li malgaje kuŝis en la lito kaj li preskaŭ ekploris, kiam ekstere konata voĉo estis aŭdebla kaj subite malfermiĝis la pordo.

Lia avoĉjo alvenis. Jam delonge li ne estis ĉe ili. Nun tamen li alvenis kaj vizitis lin.

-Saluton, kara mia nepeto! Via panjo telefonis, ke vi grave malsaniĝis. Mi venis al vi por diri fabelon. Mi scias, ke vi tre ŝatas aŭskulti tion. Ĉu ne?

La okuloj de la knabeto ekbrilis kaj mallaŭte li diris:

-Mi dankas avoĉjo! Tre bone, ke vi vizitis min kaj deziras fabeli al mi. Kiu fabelo estos la unua? – li eksidis interesiĝante en la lito.

Avoĉjo sciis multe da fabeloj kaj li fabelis ĝis vespero, kiam lia nepeto Peĉjo resaniĝis.

Ĉiutage venis avoĉjo kaj per belegaj fabeloj li distris la malsanan knabeton.

Certe ankaŭ la medikamentoj helpis, sed se avoĉjo ne fabelus, tiam Peĉjo ne estus resaniĝinta tom rapide.

-Onklo Adalberto-

Nia foto



La blazono de la departamento Somogy